

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 109 (Ninth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Julio 1929

ESPERANTO IN THE UNIVERSITIES.

(by Dr. E. Privat, Feb. "Esperanto")

Reports from the Antwerp Congress have shown how our language is progressing in University circles. At some, Esperanto groups for students have been formed, at others professors have joined also. As is now known, several Japanese scientists are using the language for articles destined for foreign readers. In some Universities Esperanto has been placed on the curriculum. This can be done in different ways. For instance, it may be simply the teaching of the language. Such courses are the most successful in numbers, but they can be established only in commercial faculties, where other languages are taught for practical ends.

On a higher level is the present preparation of Esperanto teachers. Here the course can be arranged in a pedagogic faculty, if this contains such a preparatory section, which is often a separate institution under the name of normal school.

To enter as a subject for study into the faculty of belles-lettres the Esperanto course must be divested of all that is practical or "utilitarian." It must be purely an object of science, that is, it must not be taught, but must serve as a field for language research, just as in the faculties of science and medicine the human body, animal and plant life, serve as material by which can be observed the function and evolution of different organs.

Such study, of course, has no relation to the reformist controversies on universal language. No serious-minded student occupies himself with the question whether it would be an advantage for man to have a third eye in his back, whether grass should be blue instead of green, or whether German should have all its verbs made regular and its declensions abolished, although Mark Twain would have congratulated such a quierist.

To the true linguist, not to the amateur critic, scientific research in Esperanto does not consist in voicing his own opinion as to whether Zamenhof rightly or wrongly chose this form or that, but in attentively observing how those forms were used in their life since 1887, how they evolved, grouped themselves, were of frequent or infrequent use, how they influenced one another, survived or died, were rich in derivatives, preserved their original meanings or acquired new, and so on.

But what is the good of all this? Impatience will prompt the practical-minded to ask, for he rightly yearns to see before all else, say, Esperanto signwriting on the railway carriages of the world. Certainly! Let him not grow faint in his efforts to that end. But we must remember that such linguistic studies are purely scientific. The practical one might as well ask, What is the use of comparing the grammars of Latin and German?

That Esperanto is now a recognized field for such scientific study

proves that it has become a living language, meriting the respectful attention of the Universities. It helps definitely to close the period of theoretical polemics concerning the various I.L. projects. It forces earnest people to look at the facts and note how fittingly Esperanto has become adapted to the needs of life, and to the varied expression of human thought.

And is that unimportant? No. It is possibly our most decisive confirmation. If, instead of an enthusiastically worded pamphlet, you give to the University man the monograph of Prof. Collinson on word order in Esperanto, or that of Prof. Aymonnier on its derivation, he will see at a glance that he has not to deal with some barbarous freak, but with a living, pulsating language, the study of which will instigate him both to learn and teach it.

So with our Esperanto teachers. It is very important that they should be familiar not only with the theory and fundamental rules of our language, but also that they appreciate its instinct for life and the processes of its evolution. One who had lighted upon the Esperanto translation of a well-known work, such as the Bible, and by it mastered the marvellously simple grammar of the language, would be best fitted to teach it.

At the faculty of belles-lettres at the Geneva University in the coming spring we intend to hold every Saturday a conference on these subjects, to which members of the course will themselves bring forward the results of their research. It is hoped that students from other countries will participate. Teachers or other students have permission to avail themselves of this and other courses, including that led by Prof. Bovet at the Pedagogic school. May the Geneva faculty receive encouragement in its initiative, and other universities besides those of Zagreb and Warsaw show interest in this matter.

—Trans. Robo.

H. G. WELLS PRI LA ANGLA LINGVO.

Se oni ripensas nur la disvastigon de la angla lingvo dum la 19a jarcento, oni povas facile tendenci al la opinio, ke tiu lingvo nepre fariĝos la monda ĉeflingvo. Tamen devas esti konsiderate, ke pezaj faktoroj en tiu granda disvastiĝo estis (1) la rapida plimultiĝo de anglodevenaj

kaj —parolantaj popoloj, (2) la enmigrado de fremduloj en anglolingvajn teritoriojn en nombroj tro malgrandaj por rezisti al la lingvoinfluo sin ĉirkaŭanta, kaj (3) la politika kaj komerca regado de unu popolo tro malklera por senpene lerni fremdlingvojn. Neniu el tiuj kaŭzoj estas necese ĉiamdaŭra. Post plifunda esploro de la demando oni miras eltrovi, kiel vere malrapida estis tiu disvastiĝo de la angla eĉ kontraŭ ŝajne multe malpli taŭgaj lingvoj. La angla ankoraŭ malsukcesas anstataŭi la francan en franca Kanado kaj ĝia supereco estas duba en Sud-Afriko, post preskaŭ jarcenta regado brita. La angla havas necion de la alloga kvalito de la franca, kaj la anareto, kiu monopoligas direktadon de britaj aferoj, kaj kiu verŝajne tion faros ankoraŭ kelke da jarcentoj, neniam montras multe da fervoro propagandi uzon de sia lingvo. El la multaj ideoj posedataj de la brita reĝa klaso, la malestimo al malsato de lernejoj kaj kolegioj estas bedaŭrinde unu el la ĉefaj, kaj evidenta estas ilia absoluta nekapablo kompreni la politikan signifon de la lingva demando. La hindujano, kiu pene lernas kaj uzas la anglan, renkontas ion tre similan al malama maskita per sprito. Rekompence por sia lernopeno li certe legas en la angla pri si nur malmulton, kiu ne estas hontinde malestima. Devos aŭ flori el sia propra potenco aŭ ĝis forpaso velkiĝi la ebloj iam ekzistantaj, kaj kiuj ankoraŭ ekzistas en malpliigita grado, per kiuj firmintencaj ŝtatestoj povus fari la anglan la ĝenerala lingvo de interkomunikado tra tuta Azio sude kaj oriento de la montoj Himalajaj. Tre povas esti, ke tiuj ebloj ja forpasos. Ŝajnas, ke nek la anglo nek la usonano havas konscion pri la graveco de anglolingva supereco por la estonteco de la raso, kaj tial verŝajne dum ankoraŭ multe da jaroj li reniel klopodos por direkti la iron de lingvoevoluo en Azio.

Post akra kritiko de la malalta intelekta stato de la angla literaturo kontrastata kun la franca, kaj la malfaciloj de britaj pensemoj ĉe la eldonistoj, kaj la frosta sinteno de la aristokrataro kaj registaro rilate al la intelekta mondo, Wells apelacias al la povhavuloj helpi al renaskiĝo de la pensa vivo en Britujo. Sed li ne karesas iluzion: "Se la okupaĉo de eldonado estus spirite levita, tiel ke ĝi povus enporti la tutan beletristi-

kon, tutan sciencōn, tutan nuntempan penson de la mondo en atingeblecon de ĉiu angleparolanto bezonanta kaj deziranta tion, mi profetus, ke la angla povus esti la ĉiutaga lingvo de Skandinavio, kaj Danujo, Holando, tut-Afriko, tuta Nordameriko, la Pacifikaj marbordoj de Azio kaj de Hindujo, la universa I.L. havanta bonan eblon fariĝi la tutmonda lingvo de la homaro. Sed tiu eldon-entrepreno postulas unu decidemon kaj inteligenton, pri kies ekzisto ĉe ni la tempo ankoraŭ ne donas signon; ĝi signifas veran renaskiĝon de intelekta vivo ĉe la angleparolantaj popoloj. . . . Klare estas, ke plua disvastiĝo de la angla dependas de la eblo de tia renaskiĝo." (ĉap. La lukto de la lingvoj, el "Anticipations" (1914), antaŭen-pensoj). Trad. Robo.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Post kelksemajna interrompo nia societo je 13an de majo refunkciis. Pro malagrabla vetero la ĉeesto estis nombreta, sed entuziasmo tute ne manbris.

Ni bedaŭras foriron (la 14an de junio) de fervora Johano Majstrovich, ano N.Z.E.A. k. U.E.A., al sia patrujo, Jugoslavujo. Survoje li utilis E-ton.

CHRISTCHURCH:—Grupanoj kunvenantaj ĉiuduan mardon vespere nun havas krom la kutimaj lecionoj pli da parolado ol antaŭe. La 14an de majo kelke da grupanoj ĝuis E-to-vesperon ĉe la hejmo de f-ino Saunders, kie Esperante ni elgorgis kantojn k. multe parolis. En la lasta grupvespero, la 21an de majo, tri novaj sam-oj ĉeestis, per tio kreskiĝantaj la nunan ano-nombro ĝis 28. S-ro Tooley, nia socia organizanto, jam aranĝas E-to-vesperon por ĉiu monato. Tiaj vesperoj multe helpas ĉiujn, ĉar babilante oni kutimiĝas al la lingvo parolata, kaj ĉe la mardaj grupvesperoj oni komprene studas la lingvon skribitan. La societo nun ricevas "Int. Language." k. ni esperas povi ricevi ankaŭ "Heroldo de E-to." Unu grupano, s-ro Frampton, riĉkore donacis kotizon por la laste nomita ĝis jarfino. Verdire E-to disfluas en Christchurch. Post nelonge la societo devos trovi pli grandan ĉambron, sed ĝi nuntempe estas sufiĉe tenipova, ĉar ĉiu ano ne povas alesti ĉiukunvene—se jes, la ĉambro estus troe prempakita! Grupano s-ro G. Wheel-

er, spertulo, ekzamenos anojn pri elparolo. Proksimnumere ni skribos pri nia 34a aniĝinto, ĉar certe estas ke ni jam ricevos ankoraŭ seson.

MASTERTON:—Prosperas loka grupo. Progreso de kursanoj daŭras sub sperta gvidado, k. regulaj kunvenoj ĉiulundon okazas kun ĉeest-cifero kontentdona. Notinda fakto estas, ke ĉiu ano kotizas N.Z.E.A., honoro laŭ nia scio havata de neniu alia grupo aŭ klubo. E-tajn aferojn oni priskribas de tempo al tempo en lokaj gazetoj, kiuj vole akceptas de sek-iino L. Payne. S-ro A. Dewar gvidas serion de ok lecionojn fakorgano "The Oceania Collector" eldonata en Dannevirke.

FEILDING:—U.E.A. nun havas delegiton en tiu distrikto. Marta n-ro de "Esperanto" sciigas pri enoficiĝo de s-ro S. Andrew (Denbigh-sq), malnova pioniro de E-to en N.Z., k. en 1904 unu el la vicprez-oj de la tiama nacia asocio. Multe vojaĝinta alilande, s-ro Andrew eminente taŭgas plenumi tiun gravan rolon. Gratulon!

DUNEDIN:—En majo tiu urbo ricevis viziton de s-ro C. Adcock, prez. de N.Z.E.A. Dum dusemajna resto ĉe ni li fruktige propagandis per parolado ĉe la Rotaria klubo k. aperigo de longa informodona artikolo tagĵurnale. Antaŭ ol foriri li vidis starigon de kurso ĉe la Y.M.C.A. (sek-io, s-ro G. Coley), k. donis al la kursanoj enkondukan lecionon.

WELLINGTON:—Krome la ĉiusemajne tenatajn klubkunvenojn oni aranĝis ja la 4a de junio specialan vesperon tute en E-to, por festi okupon de nova klubejo ĉe la konstruaĵo Y.M.C.A. Granda anaro ĉeestis ĝui ravan programon. Dum du horoj la alvenintaro aŭskultis karlingvajn gramofondiskojn.

F-ino C. Smythson oni elektis vicprez-o de la klubo. S-ro Adcock, prez. N.Z.E.A., viglige trapasis la urbon. Ankaŭ s-ino Drury el Christchurch, sek-io de tiu asocio, vizitanta, provizis al si adresojn de sam-oj tie, kien iros ŝi, kiu intencas pikveki nun dormantajn stelulojn.

Akra manko de lernolibroj sentigas tie ĉi nune, pro la ŝvelanta intereso en la lingvo. S-ro Amos donacis 9 al anaro de N.Z. skoltoj, irontaj por partopreni la tutmondan skoltkunvenon en Birkenhead, Britujo. Kun ili estas skolto ricevinta kelkajn lecionojn, pro tio li povos helpi la k-dojn. S-ro Amos, direktoro de Banks Kolegio k. ĉefo de Wellesley Kolegio, antaŭ ilia surŝipiĝo forte konsilis al ili

"multaj" kaj "multe da." Notaro 4/10. — 5. Vidu Gen. 9/20, 2 Reĝoj 25/12. — 6. Notaro 10/10, Gen. 46/32. — 7. Estas grave, ke post "kiel" oni uzu la ĝustan kazon. "Mi elektis lin kiel administranto" signifas "Mi, estante administranto, elektis lin," sed "mi elektis lin kiel administranton" signifas "Mi elektis lin (esti) administranto." L.R. pĝ 42. 8. "the future," la estonteco. "Estonto" signifas future person. L.R. pĝ 59, F.K. 268/12. — 9. Figura uzo de "loto" kiel en Jesaja 17/14, 57/6. Oni povas uzi "sorto" aŭ "parto" kiel en Jer. 13/25, Aĝoj 8/21, Ps. 105/11. — 10. Pri kunmetitaj (malsimplaj) verbtempoj. Notaro 1/21.

MEN!

"EZY-KREECE" TROUSER STRETCHER keeps a permanent crease in your trousers. Sent to you for 2/6. Full address: CURTIS MAIL ORDER Co., Richmond, E1.

GRAVA ĈINA ELDONAJO.

Ni ricevis el Nankin imponan alvokon al la tutmondo forme de akra protesto de la Naciista Partio, kiu diras, ke ĝi prefere apelacias la homaron ol batali kontraŭ siaj invadintoj. La sendaĵo konsistas el kelkaj fotoj montrantaj sur agoj ĉindire faritaj kontraŭleĝe de Japana soldataro. La teksto makuliĝas pro trea nombro da preseraroj, tamen donas flaman bildon de la aferstato laŭ ĉina vidpunkto. Ĉu ni atendu ion nuligdiran el la Japana registaro? (Robo)

QUEENSLAND ELECTIONS AND ESPERANTO.

During the recent elections in Queensland, the Brisbane Esp. Society asked the candidates to answer the following:

(1) In view of Australia's ever-growing relations with foreign countries, in which the language difficulty is so often felt, are you in favor of the official encouragement of the use of Esperanto by Government departments having business abroad?

(2) Are you in favor of the teaching of this language in the schools of the state, as is already done in many places in England, Bulgaria, Brazil, Czecho-Slovakia, Finland, France, Italy, Japan and other countries?

Twenty-one replies were received: Affirmative—Question (1) 13; Ques-

tion (2) 12. Negative—(1): 1; (2): 3. Non-committal—(1): 3; (2): 2.

In favor of an international language, but not competent to judge whether Esperanto suitable: 4.

Five replies are accounted for by the secretary of the Communist party, who wrote affirmatively for all its candidates.

Six candidates in favor of one or both questions were elected: Messrs. H. Russell, J. Kerr, R. Warren, G. Farnes, Owen Daniel, all of the Country-Progressive-National (Government) party, and G. Barber, of the Labor party.

Two members of the Labor party, who expressed themselves in favor of an int. language but did not know enough about Esperanto to judge of its suitability, were also elected.

As a result of the issue of the circular, some staunch supporters have been discovered, viz: Mr. H. Russell (a foundation member of the Brisbane Esperanto Club), now the Government member for Toombul; Mr. W. Childs, of Nudgee, who has taken a great interest in the society since its beginning many years ago, and Mr. J. Kerr, Government member for Enoggera, who wished to consult the society after the elections. All three emphasise their willingness to help the movement. The Communist candidate for Townsville, Mr. C. Tripp, answered in Esperanto.

The daily papers in Brisbane reported briefly this activity of the society.

PARLAMENTANOJ KAJ ESPERANTO.

Jen resumo de la angla artikolo "Queensland Elections and Esperanto":

Dum elekto de parlamentanoj de la ŝtato Kvinslando, la Brisbana Esperanto-Societo dissendis cirkulerojn al la kandidatoj, petante ilian opinion pri (1) la uzo de Esperanto ĉe la regnaj oficejoj, kiuj havas rilatojn kun eksterlando, kaj (2) instruado de Esperanto en la regnaj lernejoj.

Al demando (1) respondis jese 13 kaj al demando (2) 12 kandidatoj. Nean respondon donis al demando (1) unu kaj al demando (2) tri kandidatoj. Du-tri kandidatoj donis nur "nekompromitajn" respondojn. La Komunista partio prezentis kvin kandidatojn, kiuj ĉiuj estis favoraj; sed ili ne sukcesis ĉe la balotado. Unu el ili skribis sian respondon en Esperanto.

El la favore respondintaj kandidatoj, ses gajnis lokojn en la parlamento; kvin anoj de la reganta partio, kaj unu ano de la opozicia (laborista) partio.

LA VILA MANO.

Scenoj el Nederlanda Vivo.

(Bulthuis).

S-ro Bulthuis denove donacis al nia literaturo ankoraŭ unu longan (300 paĝan) rakonton pri sia popolo. Ĉu vere li havas aĉetantan publikon, preta igi lin fiere meti "elĉerpita" sur sia eldonlisto? Nenia antaŭreklamo, nenia voko por antaŭmendo, sed anstataŭe senbrua elpuŝo de bonpresitaj verkoj. Jen la metodo Bulthuis.

La lingvaĵo estas tiel facilglata, ke preskaŭ oni povus uzi ĝin por la nematuruloj, se la temo estus iom alinatura. Tamen restas nenotitaj en la erarlisto sufiĉe da preseraroj, kaj la Anglaj difinoj ofte estas ne ĝuste verkita. Evidente mankis al ties kompilo tiulanda kontrolokulo.

En la nunreganta modo literatura, kiam aŭtoroj prescipe celas psikologian analizon, oni ne povas ne rimarki ĉe Bulthuis tro supraĵan karakterskizadon. Liaj hombildoj estas preskaŭ krude malkompleksanimaj; ĉu ni ne petu la aŭtoron doni al ni homfigurojn, kiuj elstaras vivece kaj elvokas de ni simpatian aŭ admiran?

La vila mano signifas la pikantan konsciencan, kaj la aŭtoro lerte vestas ĝin sub ombro de arbedo, nigra nubo, kaj gratanta kato.

Diskutindaj formoj estas "plenen," "dupe," "enkorpiganto," "etaĵo," "ĵus parolinto," "flugiloj (de konstruaĵo); "akcenti" estas trans. "spite" estas uzita anst. "malgraŭ" foje, "surpriz," anst. "mir," "komplekso" estas por kelkaj neklara, oferi (doni, proponi, provizi), protekti ne signifas ŝirmi kontraŭ danĝero; ĉagren' estas trans., same kiel terur', ĵus (ĝuste), eviti (malebligi), komand' (ordon'). Ofte la verbtempoj

estas nekorektaj, kaj ankaŭ la modoj. Sajnas, ke la libro, cetere bona, tro rapidis tra la presejo. Estas esperinde, ke la verko atingos duan eldonon, kiuokaze oni ĝin saĝe rekon siderus la supron.

Robo.

GAZET-RECENZO.

La Orienta Revuo kaj La Nagasaki Junularo, samkiel verŝajne ĉiu Ekstremorienta Esp-gazeto, konsistas plejparte el nacilingvaj paĝoj. Tio estas por ni bedaŭra, ĉar verdire la temoj sufiĉone devenitaj per la okaza preso de Esp-vortoj scivolige allogas. Funda esploro prilingva, pika raporto pri intervjuo k.s. sendube trafas duoblan celon. Tio produktadas veran necesajon, nome firmkonajn Esp-istojn, pretajn instrui kore-cerbe la lingvon de Zam., kaj ankaŭ ĝi penetras la publikan penson ankoraŭ varbotan.

N-ro 1 de "La Juna Batalanto," romkatolika gazeto, tute ne estas amuzilo por infanoj, nek edifa legaĵo por piaj lernemuloj; ĝi alvokas la junajn en koro-spirito homojn, eĉ se blankharajn, por antaŭenigi la romkatolikismon kaj pacan spiriton tramenden. Multenhava, ĝi prezentas i.a. etakan artikolon pri la moralo de la Rusa junularo, kaj alian pri misia agado en Ĥinuĵo. Ĝi sentime konfesas malneŭtralecon, sed pretendas kun iom da rajto provizi legindajn eĉ por alireligianoj. Menuĉe Dagobert-Str. 28, Koln, Germanujo. (Robo).

La prefikso MIS-.

Laŭ propono de s-roj Butler, Ellersiek, Grenkamp, Kreuz, kaj de La-jarte, oni akceptis la prefikson "mis-" per 72 voĉoj "jes" kontraŭ 39 "ne": 2 ne montris opinion. Ĝi do estas nun oficiala. Ĝia signifo estas severe limigata al la senco: erar-, malĝust-, malbon-.

Of 156 roots now used in English with the prefix mis-, in the case of 154 the prefix has the meaning malĝuste, erare, maltrafe. With 9 words

SANO — SANA — SANIGA. DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106. Melbourne.

diligentan studon de E-to. Ĉe Wellesley Kolegio instruisto s-ro Lohore gvidas kurson de 12 knaboj ĉiumarde. Tiu kurso estas kroma al tiu, konsistanta el edukistoj, samloke gvidata de s-ro W. Edmanson.

MELBURN:—Ce kunveno je la 30a de Aprilo s-ro C. Ballard alparolis pri memorpovo. La temo forte kaptis atenton de ĉiuj. Fine de la kunveno kursanoj adiaŭis s-ron P. Hudson, kiu tuj komencos vojaĝon al Hindujo. Vive anoj kantis "Car li estas bonegulo." Antaŭ kelksemajno s-ro Hudson regalis anojn per rakonto pri antaŭa vojaĝo kaj vizito al Konstantinopolo.

La 21an de Majo la Melburna Soc. feste vesperis en la klubejo. Dancinte k. amuziginte ĝis la 11a horo, la ĉeestantoj enronde kantis "Auld Lang Syne." S-reto Milligan, mariste vestita, dancis lerte la Maristan Dancan, kaj f-inoj L. Irwin, V. Cox k. s-ro Bishop ludis unuaktan komedion "En Minaca Dango." S-ro J. Skurrie mallonge parolis propagande.

PERTH:—The Nigra Cigno Grupo is henceforth known as the "Westralian Esperanto Society," with Mr. H. Byatt as president. There are 22 members, of whom five have offered to teach. Classes of different grades have therefore been arranged. The club meets on Fridays at 7.30 at 197 Murray-st., Perth, in the centre of the city. The first part of the evening is devoted to business, the second to instruction and the last to social and conversational purposes.

SIDNEJO:—S-ro G. Fleming pri-traktis la metran sistemon, sub la titolo, "Iuj Popularaj Ideoj." Atentiginte ke ni jam havas unuecan i.l., Esperanto, kaj ankaŭ internaciajn komprenigilojn en aliaj sferoj, ekzemple, la muzika notaro, kaj la Morsekodo en radio, li diris ke en britoparolantaj landoj oni ankoraŭ uzas antikvan kaj malfacilan sistemon de mezuroj. Li kredas, ke tiu anakronismo malaperos, kaj ke iu simpla, logika sistemo de mezuroj, kiel la metra, jam grandparte internacia, estos uzata ĉie. La bone-konata S-ro Serišev ankoraŭ unu fojon paroladis pri Rusujo. La Psikologio de la Rusa Popolo estas temo tre malfacile traktata por unuhora lekcieto, sed nia parolflua samideano sukcesis klarigi multajn ecojn de la diversaj popoloj, kiuj formas la rusan nacion.

AL LA TUTMONDA INSTRUITARO ESPERANTISTA!

Preskaŭ ĉiutage oni urĝe petas, aŭ eĉ energie postulas de mi materialon statistikan pri la temoj "Esperanto en lernejoj" kaj "Esperanto inter la instruistaro." Ĉar ne ĉiuj gekolegoj abonis kaj legas nian "Internacian Pedagogian Revuon," mi nun per niaj aliaj esperantistaj gazetoj petas:

1e Anoncu vin kiel instruistojn esperantistajn sendante vian precizan adreson!

2e Bonvolu raporti, ĉu en via urbo aŭ vilaĝo oni (ne nur vi persone) iam ajn instruis aŭ hodiaŭ instruas Esperanton en iu ajn lernejo. Skribu la nomon de la koncerna lernejo!

3e Bonvolu turni vin, se vi bezonas korespondantojn el la tutmonda kolegaro por vi mem aŭ por viaj klasoj (pro internacia korespondado de lernantoj) al ni!

Ni ordigos la korespondan aferon sisteme kaj laŭplane. Cetero ni jam kolektis la adresojn de pli ol 4,000 esperantistaj geinstruistoj el pli ol 50 landoj.

Ricevinte viajn sciigojn, ni kapablos aranĝi kaj doni konfidindan statistikon pri la supre aluditaj temoj, kiu estas nepre necesa.

Sendu la materialon al f-ino Martha Moelke, Sommerfeld, Niederlausitz (Germanujo), kun kiu mi en "Kunlaborado" kun I.A.L.A., New York, kaj la Instituto J. J. Rousseau, Geneve, zorgos pri la statistiko.

D-ro. Dietterle.

P.M. KOLEKTISTOJ.

Volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj. Rev. Walter Noske, The Parsonage, Henty, N.S.W. Aŭstralio.

AT LAST!

S.A.T. announces publication before the end of the year of its All-Esperanto Dictionary, 450-500 pages. The sample leaves are rich in detail and citation. The work will prove a strong factor in consolidating internationality of usage. It is claimed that S.A.T. ideology has not influenced the compilers, headed by Prof. Grosjean-Maupin, of the Esp. Akademio. The rebate price for those ordering before publication is 7 G.M. (7/-).

Address: R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-0-27, Germany.

CHINESE CONSUL ON ESPERANTO.

Although not conversant with the state of Esperanto in China, I have

seen evidences of its activity there. I know personally of the difficulties confronting the Chinese owing to the diversity of language, not only in their own country but also in their relations with Europe and America, and I wish to express my belief in the ability of Esperanto to abolish, at least in great measure, this latter hindrance to better relations. It would be indeed a wonderful thing for the Chinaman whose interests are centred in the Western world to find it necessary to learn only one simple language instead of, as at present, the chief tongues of Europe. The horizon revealed by Esperanto is vast, there are in the language the most attractive possibilities. May the nations be drawn closer together through its agency.

Signed: FARTSAN T. SUNG,
Consul for China in Melb.

NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas ricevon de abonoj jene:—J. F. Hills, Nov., '29; A. R. Cohen, anonco k. abono 20/-, Julio '30; Rev. Galloway 4/6, Marto '29; s-ino Lloyd 4/6, Junio '30; E. C. Jack 5/-, Junio '30; W. H. kaj J. McGuigan ĉiu 5/-, Aŭg. kaj Majo '30; Auckland grupo 5/-, Majo '30; f-ino P. McCabe 4/6, Junio '30; f-ino L. W. Saw 4/6, Julio '30; C. Dornbusch 4/6, Junio '30.

TRADUKO 14.

La ŝargo de la nigrulo.

(de Charles Barrett en The Sun, Melbourne).

(Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B. E.A.). Sek-io, Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E10.

La problemo de la indiĝeno fariĝos ĉiam pli kaj pli (2) premanta kun la jaroj (3). Nur malmultaj (4) homoj konscias, ke sur la Aŭstralia kontinento ekzistas pli ol sesdek miloj da indiĝenoj kaj pli ol dek sep miloj da rasmiksuloj. Ju pli la blankulo puŝas sian koloniadon en la internlandon, des pli malfeliĉa fariĝas

la loto (9) de la indiĝeno. Diversaj rimedoj estas proponitaj por malhelpi lian iom-post-ioman ekstermigon. En ĉi tiu artikolo mi diskutas iujn el tiuj proponoj.

Ofte oni sugestias novajn metodojn por pagi malnovajn ŝuldojn, tamen neniu metodo estas farebla sen la apogo de tianta mono. Ni konfesos nian ŝuldon al la indiĝeno, sed ĉe tro multaj (4) el la penoj por pagi ĝin mankis la necesaj kondiĉoj de sukceso, nome sincera, vasta konsento kaj firma decido agi juste al la nigrulo.

Ŝargon ni metis sur la ŝultrojn de la nigrulo. Li havas en la lokoj de sia loĝado, amikojn inter la kultivistoj (5) kaj brutedukistoj (6) en la malproksima internlando, tamen li havas ankaŭ agemajn mal-amikojn, kiuj rigardas la indiĝenon kiel peston (7) kaj senrajtulon. "Forviŝu ilin per maŝinpafilo." Tion mi aŭdis dirata de brutedukeja laborule en Meza Aŭstralio.

Ĉe la baldaŭa konferenco en Melbourne por konsideri pri la estonteco (8) de la indiĝenoj, misiistoj kaj aliaj amikoj de la indiĝenaj gentoj eble elpensos plenumeblan projekton por helpi la nigrulon kaj iom malpezigi al li lian loton (9). Ĉe la lasta ĉiujara kunveno de Aborigines' Friends' Association (asocio de amikoj de la indiĝenoj) la komitato konsilis, ke, traktante la indiĝenan problemon, oni (10) rigardu kiel unu teritorion (7) la tri grandajn regionojn rezervitajn por la indiĝenoj en Suda, Meza kaj Okcidenta Aŭstralio, plue, ke tiu teritorio estigu sub la administrado de la Commonwealth (Federacia) registaro, kaj ke ĝi ricevu (10) la nomon Aboriginal Territory, Central Aŭstralia (Indiĝena Teritorio, Meza Aŭstralio). (daŭrigota).

NOTARO 14.

2. Kp. F.K. 160/24, Mart. 20/19. — 3. "kun la (pasado de la) jaroj." Kp: "kun la tempo ĝi fariĝos." Fab. de And. pt. ii, 36/35, 94/12. — 4. Pri

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

it has the additional meaning malbon-. With one only (mistrust) it has the meaning mal-.

It is advisable to restrict the use of mis- in Esperanto to the meaning erare, malguste, maltrafe. For the meaning malbon- we already have the choice between the general pejoratives aĉ and fuŝ and the moral pejorative fi-. In no case must mis be used with the meaning mal.

Compare malordo (disorder) with misordo (malgusta ordo); and fikanti (to sing something morally shameful), kantaĉi, fuŝkanti (to sing "rottenly"), with miskanti (to sing amiss, however perfectly—perhaps the wrong note or at the wrong moment). M.C.B.

LA INFLUO DE BONAJ VIRINOJ.

Malofte oni aŭdas pri virinoj, fame konataj pri ilia elpensemeĉo aŭ intelekta forto. Ĉiam la viroj tenas la honoron de tio, kaj tra la jarcentoj la dirado-skribado estas pri bonaj, korpuraj virinoj, kiuj modele donadas formon al la karakteron de gehomidoj, kaj gvide metas la piedetojn sur firmajn vivvojojn. Per tiu sindona servado ili efektive faras pli laŭdindan laboron, ol pentradon de okul—aŭ eĉ kor-frapantaj bildoj, laŭ verkadon de epohfarantaj libroj, aŭ la komponicon de brilantaj operoj. "Certe estas fakto," diris Joseph de Maistre, "ke la virinoj ĝis nun donas al la mondo nenian ĉefverkon. Ili ankoraŭ malhavas honoron enmondigi iun "Iliad," iun "Hamlet," iun "Phaedre," iun "Paradise Lost," iun "Tartuffe": ili ankoraŭ designas neniun Preĝejo de Sankta Petro, kompozicias neniun "Messiah," skulptas neniun Apollo Belvedere, pentras neniun "Last Judgment": la algebro, la teleskopo, kaj la lokomotivo naskiĝis en la cerbo de viroj, kaj tute ne virinoj; tamen ĉi lastaj faris kaj faradas ion multe pli valoran kaj eĉ pili longe daŭran, ol tio, ĉar ĉe iliaj genuoj justaj kaj virtaj viroj unue ricevis stimulon al la bono, la enkoran senton pri la deo—kio estas ja el ĉiuj la plej ricevinda donaco en la universo. Bona virino estas la ĉefverko de la Naturo mem."

Westralian Esperanto Society, Niĝra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Queensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.